# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda


Aprilo 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 4 (1174)

**Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**

ISSN 1163.0442 **5 Eŭroj**

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


# SENNACIECA REVUO




*Post longa tempo aperas nia SennacciecaRevuo, kiel suplemento de tiu ĉi numero de Sennaciulo*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj,*
*Vi tenas en la manoj la aprilan numeron de Sennaciulo kaj kun ĝi finfine la novan Sennaciecan Revuon. Espereble vi estos kontenta pri ĝia aspekto kaj ĝia enhavo. Nia redaktoro promesas ekde nun prepari ĝin regule, ĉiujare, en la sama tempo. Evidente, tio ankaŭ dependas de vi kaj de la ricevita materialo.*
*Pro la monateco de Sennaciulo ni ne povas komplete sekvi la aĉan militon, kiu jam komenciĝis malgraŭ la daŭraj protestoj en la tuta mondo. Nia deklaro estas daŭre aktuala kaj ni invitas vin ĉiujn partopreni en porpacaj manifestacioj en viaj landoj kaj urboj. Ni kontraŭu la agadon de la modernaj barbaroj en ilia kruela imperialisma milito.* ***Ĉiu milito estas krimo kontraŭ la homaro!***
*Kamaradece al ĉiuj,*
*via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annnuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

**Komunista frakcio**

# 14a konferenco de IKEK
# 23-28.05.2003
# en Banja (apud Soĝa)Bulgario

Kongrestemo:
Komunistaj movadoj en Bulgario kaj la mondo.
Renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.


Aliĝkotizo: 25 eŭroj
Pago de kotizo al : Dieter Rooke, Äussere Klus 14 CH-4702 Oensingen, Svisio. UEA-konto: rook-1

## SAT BEZONAS NOVAN KOMPUTILON

Nia malnova komputilo eluziĝis kaj necesas ŝanĝi ĝin. La riparoj de la malnova nun tro kostas. Por la aĉeto de la nova materialo ni bezonas proksimume 2500 eŭrojn.

Ni petas ĉiujn niajn membrojn kaj legantojn finance helpi tiun aĉeton. Ĉiu donaco estas bonvena. La nova materialo faciligos la eldonlaboron kaj la ĝeneralan funkciadon de nia asocio.

Anticipan dankon al ĉiuj!




## *Nova PIV aperis !*

*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# SEN KOMENTO

*En la revuo "Ondo de Esperanto" aperis ĉi sube legebla artikolo pri SAT, kie ni povas bone vidi kiel vidas nin kaj opinias pri ni iuj t.n. "neŭtralaj amikoj". La artikolon subskribas pseŭdonome, iu Komitatano Z. Ni invitas vin ĉiujn, membrojn de la "formortanta" SAT, reagi al tiu artikolo. Bonvolu sendi viajn reagojn al "ONDO DE ESPERANTO", ab.ja. 1248, RU-236039 Kaliningrad, Rusio. La kopion de via reago eventuale sendu al la SAT-sidejo. Dankon.*

*La redakcio*

## Ĉu SAT havas estontecon?

La evento de la pasinta jaro estis la apero de la nova PIV. Plenmerite ĝia ĉefrespondeculo estis proklamita La Esperantisto de la Jaro. Komitatano Z volonte aliĝas al la gratulantoj de Michel Duc Goninaz!

PIV estas eldonaĵo de SAT, tiu internacia organizaĵo, kiu ne permesas nomi ĝin internacia sed sennacia. Tiun koncepton ni filozofie malpli harditaj movadanoj apenaŭ scias bildigi al ni mem kaj certe ne traduki. Scii krome, ke sennacieco kaj sennaciismo estas malsamaj aferoj, kompletigas la enigmon. Sed tio flanken.

Longe SAT estis la sola grava kontraŭforto de UEA, aŭ ĉu pli bone diri apudforto, ĉar diference de la poresperanta UEA, ĝi ĉiam ŝatis emfazi sian peresperantecon. Logike do ĝi eĉ ne povus esti rivalo de UEA, sed en la praktiko ĝi tamen aperis ne nur kiel rivalo sed kiel konscia kontraŭulo de UEA, eĉ malamiko, kiu insiste persvadis siajn anojn eviti la fi-neŭtralan UEA. La bojkoto neniam plene sukcesis. Sufiĉe multaj SAT-anoj trovis ĝin sensenca kaj membris en UEA ankaŭ en la plej floraj tempoj de SAT. Gaston Waringhien, la ĉefredaktoro de PIV, eĉ akceptis honoran membrecon de UEA.

Iam SAT apenaŭ postrestis UEA rilate membronombron, sed nun ĝi postrestas eĉ iujn fakajn asociojn. Ĝi silentas pri sia statistiko, sed supozeble ĝi nuntempe arigas malpli ol mil membrojn. En la pasintjara referendumo pri statutŝanĝo voĉdonis 183 membroj. Se tio estus ĉ. 30% de la membraro, kiel en poŝtaj balotoj de UEA, la tuta membraro estus ĉ. 600. Eble (ĉu espereble?) la SAT-anaro estas malpli aktiva ol la UEA-anaro, ĉar ĝi estas tre maljuna, kaj do la membraro tamen pli proksimas al 1000. Klaras ĉiukaze, ke SAT rapide malkreskas, ĉar ĝiaj membroj formortas. Ĝia kaso minacas elĉerpiĝi eĉ pli rapide. De multaj jaroj la deficito estas sur tia nivelo, ke ĝi forviŝos la kapitalon ene de tri-kvar jaroj. Enspezoj pro la nova PIV verŝajne ne multe helpos. Neeviteble Sennaciulo baldaŭ devos ekaperi nur dumonate anstataŭ monate. La sola plentempa oficisto proksimiĝas al emeritiĝo. Rimedojn por dungi posteulon SAT verŝajne ne plu havos.

SAT suferis de malfavoraj mondpolitikaj kondiĉoj pli ol UEA, sed sian malkreskon ĝi semis mem. La finfine abolita statuta postulo, ke la plenum-komitatanoj estu

Fino, paĝo 52

### PLIA GRAVA PERDO POR S.A.T.



Merkrede la 5-an de marto aperis en nia reta leterkesto jena mesaĝo:

"Kun doloro ni informas vin pri la morto, la 3-an de marto, de Sinjoro kaj Sinjorino LEDON, sekve de grava trafikakcidento en Brazilo. Familio Ledon".

Kia ŝoko! Terure! Kia perdo por SAT kaj por ĝenerala Esperanto-movado!

**K-do Gilbert René LEDON**
**(matr. 28.926),**

72-jara, malnova fidela SAT-ano estis nia landa peranto en Brazilo. Tre konvinkita, ĝisosta SAT-ano, sennaciulo, ĉie defendis kaj diskonigadis nian Asocion. Kiel landa peranto, li multe varbis kaj eĉ finance subtenis tiujn gekamaradojn, kiuj deziris esti SAT-anoj sed havis financajn problemojn. En la jaro 1988, k-do Ledon perfekte organizis 61-an Kongreson de SAT en Campos-do-Jordão. Krom tio li aktive kunlaboris en Sennaciulo, SR, Liberecana Ligilo kaj aliaj SAT-eldonaĵoj, memeldonis plurajn gravajn verkojn kaj tre ofte donacis la stokon favore al SAT.

Lia kara edzino,
**k-dino Symilde SCHENK-LEDON,**
**(matr. 29.325),**

77-jara, ĉefdelegito de UEA por Brazilo, komitatano A. Ŝi faris multon por Esperanto kaj la movado en Brazilo.

La du karaj gekamaradoj kaj amikoj restos ĉiam en niaj memoroj kaj koroj.
Ni sincere kondolencas al iliaj infanoj, el kiuj unu filino, Lilia, estas membro de SAT, kaj al aliaj familianoj.

La Redakcio